# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

Nº 22 Aprilo 1927

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al „ESPERANTO“ ☆ Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

TEKSTO: La situacio en Sovjeta Ruslando. — La Konvencio pri Plumboblanko. — La Komuna Konsila Komisiono pri Agrikulturo. — Kunveno de la Komuna Mara Komisiono. — La Komitato pri la Okhora Labortago. — La 34-a kunsido de la Administra Konsilantaro. — Progreso pri konfirmo de konvencioj.

### La situacio en Sovjeta Ruslando.

La raportoj kaj diskutoj de la Sepa Kongreso de Laboristaj Sindikatoj en Ruslando, kunveninta en Moskvo je la fino de la pasinta jaro, donas tre interesajn informojn pri la socia kaj ekonomia situacio en la lando.

**Senlaboreco.** — El la raporto de S-ro Schmidt, Komisaro pri Laboro, ŝajnas ke senlaboreco treege maltrankviligas la Komisariaton kaj la Sindikatojn. Dum la jaro 1926, industrio okupis 400000 laboristojn ne antaŭe okupataj; sed tamen la nombro da senlaboruloj registritaj estis 100000 pli ol antaŭ unu jaro. Je la fino de 1926, la senlaboruloj registritaj en la dungoficejoj estis 1 023 000. Ekzistas motivoj por kredi, ke la tuta nombro da senlaboruloj estas ĉirkaŭ 2 000 000.

La plimulto de senlaboruloj konsistas el nelertaj laboristoj, kamparanoj enirintaj en la urbojn por gajni la vivadon, sezonaj laboristoj restantaj en la urboj, anstataŭ reveni al iliaj vilaĝoj, intelektaj laboristoj kaj personoj malriĉigitaj de la revolucio.

La situacio de la gejunuloj estas tre bedaŭrinda. Ŝajnas ke estas pli ol miliono da gejunuloj malpli ol 18-jaraĝaj tute senokupaj.

La delegitoj al la Kongreso konsentis kun la Komisaro pri la faktoj, sed multaj el ili kulpigis la Komisariaton kaj la dungoficejojn pri senefikeco en la batalo kontraŭ senlaboreco.

La Komisaro rekomendis kiel rimedojn, ke kolektivaj kontraktoj devigu entreprenojn dungi 90 % de iliaj laboristoj pere de la dungoficejoj, kaj ke libera dungo estu permesata nur por tre lertaj laboristoj. Li ankaŭ rekomendis malpliigon de laborhoroj kaj la okupon en aliaj laboroj en la sama entrepreno de laboristoj kies oficoj estas forigitaj. La Komisariato ankaŭ intencas agi energie kontraŭ senlaboruloj, kiuj rifuzas proponitajn laborojn, kaj kontraŭ needzigitaj personoj, kiuj ne volas translokiĝi por akcepti novan laboron.

Pri asekuro kontraŭ senlaboreco, la sindikatoj plendas pri la nesufiĉeco de la kompenso kaj ke malmultaj senlaboruloj ricevas ĝin. Nelertaj laboristoj kaj la plimulto de intelektaj laboristoj ne profitas de la asekuro. La Komisariato intencas plimultigi la senlaborulojn profitantajn de la asekuro kaj la kompenson pagatan.

La sindikatoj rekomendas ke publikaj laboroj por okupi la senlaborulojn estu plibone organizataj. La komisaro pensas, ke la plej bona rimedo estas la asocioj de senlaboruloj por kolektiva produkto. Ekzistas nuntempe ĉirkaŭ 2 000 tiaj asocioj, kun ĉirkaŭ 90 000 membroj. Pro politikaj motivoj, por ke tiuj asocioj ne akiru la komercan spiriton, la Komisariato pri Laboro klopodas por kunigi ilin kun la lokaj produktaj kooperaj societoj. La delegitoj de la sindikatoj kontraŭstaras tiun politikon kaj opinias, ke estus preferinde meti la asociojn sub la direkto de la aŭtoritatoj administrantaj la Ŝtatindustrion.

**Sendanĝereco.** — „Oni devas konfesi“, diris la Komisaro pri Laboro, „ke ekzistas tendenco al plimultiĝo de akcidentoj. Tio klariĝas precipe per la fakto, ke antaŭrimedoj ne estas aplikataj sufiĉe rigore. Intensa laboro, akcelita produkto kaj difekta ilaro estas ankaŭ oftaj kaŭzoj de akcidentoj“.

De Julio 1925 al Julio 1926, la ofteco de akcidentoj por 10 000 pliiĝis de 310 al 410. En 1913, la akcidentoj en la minindustrio estis 47 jare por 1000 laboristoj. Nuntempe ili estas inter 54 kaj 70.

Laŭ ciferoj cititaj de membro de la Centra Komitato de la Sindikato de Ministoj, okazis en 1923-1924 (1 Oktobro al 30 Septembro) 109 akcidentoj por 1000 laboristoj kaj en 1924-1925 152. Dum la nuna duono de la periodo 1925-1926, la akcidentoj en la industrio plimultiĝis je 48 p. c. kompare kun 1924-1925. En la konstruindustrio en Moskva en 1926, la nombro da akcidentoj estis dekfoje la nombro en 1925. La procento de gravaj akcidentoj ankaŭ pliiĝis. En Siberio, ekzemple, la pliiĝo estis 100 procentoj en 1926, kompare kun 1925.

La laboristoj kulpigas la direktorojn de la Ŝtatindustrio pri senzorgeco rilate al la protekto de la laboristoj kontraŭ akcidentoj, kaj ĉiuj konsentas pri la nekompetenteco de la laborinspektoroj.

**Nemanaj Laboristoj.** — Multaj plendoj fariĝis pri la malbonaj laborkondiĉoj de nemanaj laboristoj, precipe komizoj, instruistoj kaj kuracistoj.

**Laborhoroj.** — La delegito de la fervojistoj plendis pri la malobservo de la reguloj pri laborhoroj. Li diris, ke en neniu fervojo la reguloj estas obeataj, sed ke la laboristoj estas ekspluatataj, kvazaŭ ne ekzistus laborleĝoj.

**Produkto kaj salajroj.** — La demando pri salajroj elvokis vivan diskuton. La politiko de la sindikatoj pri tiu demando estis ekzamenita laŭ la jenaj tri vidpunktoj:

1. la nuna situacio de la Ŝtatindustrio kaj ĝia ebla disvolviĝo;
2. la reguligo de salajroj;
3. la rilatoj inter la sindikatoj kaj la direktoroj de la Ŝtatindustrio.

S-ro Kouibychev, Prezidanto de la Superega Ekonomia Konsilantaro, resumis la ekonomian situacion jene:

La unua periodo de rekonstruo post la jaroj de komunismo kaj civila milito finiĝis. Produkto alproksimiĝas al la nivelo en 1913. La periodo 1925-1926 montris pliiĝon je 40 % kompare kun 1924-1925. Tamen la ebleco por disvolviĝi industrion per la kapitalo kaj ilaro restantaj de la malnova reĝimo nun ĉesis. La malnovaj rimedoj estas preskaŭ tute eluzitaj. Oni devas krei ion novan, aŭ reorganizi laboron kaj alie klopodi por pliigi produkton. La lando suferas de krizo de nesufiĉa produkto.

Laŭ projekto preparita de la Registaro, industrio devas, en 1926-1927, pliigi ĝian produkton je 18 procentoj. Tio estos tre malfacila. Ĉiuj fakoj de industrio suferas de grava manko de utiligebla kapitalo.

Krom la sumoj provizotaj de la Ŝtato kaj de la bankoj, ndustrio devos mem pliigi ĝian utiligeblan kapitalon dum 1926-1927 je 500 000 000 rubloj.

Tio necesigos malpliigon de kostoj. Sekve la individua produkto devos pliiĝi pli rapide ol salajroj.

Iuj el la reprezentantoj de la Sindikatoj protestis, ke la laboristo ne povas senlime pliigi siajn fizikajn klopodojn. Oni devas pli atenti pri raciigo de produkto. Intensigo de laboro dependas de plibonigo de laborkondiĉoj. La nekompetenteco de la direktoroj de Ŝtatindustrio estas grandmezure responda pri la altaj kostoj de produkto.

S-ro Tomsky esprimis la ideojn de la Centra Konsilantaro de la Sindikatoj, kiu bone komprenas ke en la nuntempaj cirkonstancoj, ĝenerala pliigo de salajroj ne estas ebla. La sindikatoj devas nur certigi, ke salajroj estu tenataj je la nuna nivelo. Oni devas ankaŭ malpliigi vivkostojn per pli bona organizo de kooperaj societoj.

Alia propono estas la egaligo de salajroj, per la malpliigo de la troa diferenco (preskaŭ de 1 al 10) inter la salajro de la nelerta laboristo kaj tiu de la tre lerta

Tre viva diskuto okazis pri la reguligo de salajroj kaj forta kontraŭemo montriĝis de multaj delegitoj de sindikatoj kontraŭ la reguligo de salajroj de la flanko de la Ŝtato. Fine, la Kongreso akceptis, per malgranda plimulto, la principon de Ŝtatreguligo, sed kondiĉe ke la Centra Konsilantaro de la Sindikatoj kaj la centra komitato de ĉiuj individuaj sindikatoj estu konsultataj, kiam la koncernataj Ŝtatorganoj preparas projektojn por la distribuo aŭ pliigo de salajroj.

**Laborkonfliktoj.** — La diskutoj montris ke, depost kiam la Ŝtatindustrio komencis funkcii laŭ komercaj principoj, la rilatoj inter la Ŝtatorganoj kaj la Sindikatoj pli kaj pli similas al la rilatoj inter patronoj kaj sindikatoj en aliaj landoj La Ŝtatorganoj klopodas por malpliigi kostojn, inkluzive salajrojn, kaj la sindikatoj devas protekti la interesojn de la laboristoj. Konfliktoj ofte okazas kaj la rolo de akordigo kaj arbitracio fariĝas ĉiam pli granda. Oni plendis pri la difektoj de tiuj institucioj kaj proponis diversajn plibonigojn.

---

## La Konvencio pri Plumboblanko.

Greklando lasttempe konfirmis la Projekton de Konvencio pri Plumboblanko akceptitan de la Internacia Labora Konferenco en la kunsido de 1921. Tiu Konvencio do estas nun konfirmita de dektri Ŝtatoj, nome: Aŭstrio, Belgujo, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉilio, Estonio, Francujo, Greklando, Latvio, Polujo, Rumanio, Hispanujo, kaj Svedujo.

---

## La Komuna Konsila Komisiono pri Agrikulturo.

La Komuna Konsila Komisiono pri Agrikulturo, konsistanta el ses membroj de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo kaj ses membroj de la Konstanta Komitato de la Internacia Instituto de Agrikulturo en Roma, kunvenis en Genève la 24an kaj 25an de Januaro, sub la prezido de S-ro Arthur Fontaine. Ĉeestis ankaŭ S-roj Oversted kaj Vanek (anstataŭanto de S-ro Carlier), de la mastra grupo, kaj S-roj Hermann Müller kaj Schürch, de la laborista grupo de la Administra Konsilantaro, kaj S-roj Bilbao, Brebbia, Van Reyn kaj de Vuyst, de la Internacia Instituto de Agrikulturo. S-ro Albert Thomas, Direktoro de la Internacia Laboroficejo, kaj S-ro Dragoni, Direktoro de la Internacia Instituto de Agrikulturo, ankaŭ ĉeestis.

La Komisiono ekzamenis diversajn proponojn por certigi la plej bonan kunlaboron kun spertuloj. Ĝi konstatis la laboron faritan komune de la Internacia Laboroficejo kaj la Internacia Instituto pri agrara reformo, profesia edukado en agrikulturo kaj agrikultura kooperado.

Ĝi studis metodojn de plia kunlaboro por kolekti dokumentaron pri laborkosto kiel faktoro en la tuta kosto de agrikultura produktado kaj pri laborhoroj en agrikulturo.

La Komisiono faris diversajn decidojn pri ĝia estonta laboro.

La Prezidanto gratulis la membrojn de la Komisiono pri la bonaj rezultatoj akiritaj per la intima kunlaboro de la Internacia Laboroficejo kaj la Internacia Instituto de Agrikulturo.

---

## Kunveno de la Komuna Mara Komisiono.

La Komuna Mara Komisiono, starigita de la Internacia Labora Konferenco por helpi la Internacian Laboroficejon en la studo de maristaj demandoj, kunvenis en Genève, de la 20a al la 22a de Januaro, sub la prezido de S-ro Arthur Fontaine, Prezidanto de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo. La ŝipposedantoj estis reprezentataj de S-roj Cuthbert Laws (Granda Britujo), Matsukata (Japanujo), Porozio (Italujo), de Rousiers (Francujo) kaj Salvesen (Norvegujo); la maristoj de S-roj Ehlers (Francujo), Fimmen (Nederlando), Henson (Granda Britujo), Köhler (Germanujo) kaj Lungren (Svedujo), kaj la administra konsilantaro de la Internacia Laboroficejo de S-ro Lecocq, de la mastra grupo kaj S-ro Jouhaux de la laborista grupo.

La Komisiono ekzamenis la raporton de S-ro Albert Thomas pri la ĝenerala agado de la Oficejo rilata al la maraj aferoj. Ĝi konstatis la progreson de la konfirmo de maraj konvencioj. La nombro de tiaj konfirmoj pliiĝis dum la jaro de 55 al 69.

La Komisiono sin informis pri la studoj faritaj de la Oficejo pri iuj problemoj komisiitaj al ĝi. Ĝi aprobis la detalan programon de enketoj prezentitan al ĝi de la Oficejo pri la laborkondiĉoj en la fiŝkapta industrio. Ĝi ankaŭ atentis la demandon pri sociaj asekuroj por maristoj. La komisiono sciiĝis, ke ĝenerala raporto pri malsanasekuro estas preparita de la Oficejo por la Konferenco en 1927; kaj ke tiu raporto ampleksas la regularojn aplikatajn al maristoj.

Pasinte al la demando pri la protekto de la sano de maristoj, la Komisiono notis kun kontento la starigon de konstanta komuna komitato de la Ligo de Ruĝakrucaj Societoj, la Higiena Fako de la Ligo de Nacioj, kaj la Internacia Laboroficejo, por ekzameni la rimedojn, kiuj povus faciligi la kuracadon de maristoj kaj ilian boneston surŝipe kaj en la havenurboj.

La Komisiono tiam ekzamenis la demandon pri sendanĝereco en la ŝarĝado kaj deŝarĝado de ŝipoj. Ĝi opiniis, ke la demando pri markado de la pezo de pakaĵoj transportataj surŝipe povus esti enmetata en la tagordon de unu ĝenerala kunsido de la Konferenco.

La Komisiono diskutis la decidojn de la Naŭa Kunsido de la Konferenco, interalie, rezolucion pri la studo de la punoj altrudataj en la diversaj landoj por malobservo de dungokontraktoj de maristoj. Ĝi konkludis, ke konvenas daŭrigi la studon de la ekzistantaj leĝoj. Ĝi favoris la enmeton en la tagordon de baldaŭa mara konferenco, kiel temo por Rekomendo, de la demando pri la kondiĉoj de la restado de maristoj en la havenurboj. Ĝi ankaŭ aprobis la projekton de enketo, proponitan de la Oficejo, pri la laborkondiĉoj ĉe la akiro de spongoj kaj perloj.

La plej grava afero pritraktita de la Komisiono estis la rezolucio de la Naŭa Kunsido de la Konferenco petanta al la Administra Konsilantaro, ke ĝi enmetu en la tagordon de speciala mara kunsido de la Konferenco en 1928 la demandon pri la reguligo de laborhoroj surŝipe. La Komisiono devis esprimi ĝian opinion pri tiu peto.

La vidpunkto de la ŝipposedantoj estis klarigita de S-roj Cuthbert Laws, Salvesen, Rehmke, de Rousiers, kaj Matsukata. Ili diris, ke ŝajnas al ili ne eble apliki unuforme surŝipe la ok-horan labortagon kaj ke ne estus utile diskuti nuntempe ĉi tiun

problemon en Internacia Konferenco. Ili pensis, ke la Packontrakto rigardis la okhoran labortagon nur kiel idealon atingotan, kaj ke la specialaj kaj komplikitaj kondiĉoj de maraj entreprenoj malebligas aktuale la modifon laŭ ĝeneralaj principoj de la laborreguloj jam starigitaj.

Por la maristoj parolis S-roj Henson, Köhler, Lundgren, Jouhaux, Ehlers kaj Fimmen, kaj ankaŭ S-ro Brandt (Belgujo), en la nomo de la Internacia Organizaĵo de la oficistoj de la komerca ŝiparo. La laboristaj reprezentantoj rimarkigis, ke la malpliigo de laborhoroj en la ŝiparo estis konsiderita jam en 1919 en Washington; ke, krom tio, temas pri efektivigo de rezolucio formale akceptita de la Konferenco la pasintan Junion, por studi ĉu estas eble reguligi internacie la daŭron de laboro surŝipe, kaj ne en la unua momento starigi la rigoran sistemon de la okhora tago aŭ la kvardekokhora semajno. La principoj difinitaj de la Konferenco en Washington kaj la intereso de ekonomia paco kaj socia progreso postulas, ke la maraj entreprenoj ne restu malantaŭ la industriaj kaj agrikulturaj entreprenoj, sed ke ili ankaŭ klopodu por malpliigi la daŭron de laboro.

Iuj delegitoj diris, ke la enkonduko de la okhora labortago en la francan komercan ŝiparon rezultigis pli racian organizon de la laboro kaj ke la sekvoj de la ŝanĝo estis ĝenerale bonaj.

Fine la Komisiono decidis, per sep voĉoj kontraŭ kvin, rekomendi al la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo, ke ĝi enmetu la demandon pri reguligo de laborhoroj surŝipe en la tagordon de speciala mara kunsido de la Konferenco en 1928.

Per unuanima decido, ĝi proponis, ke oni enmetu en la tagordon de la sama kunsido la jenajn du demandojn: la protekto de la maristoj en la okazo de malsano, inkluzive la kuracado de vunditoj surŝipe, kaj la plibonigo de la kondiĉoj de restado de maristoj en la havenurboj.

Finfine, la Komisiono sin okupis pri diversaj demandoj rilataj al ĝia propra konstitucio. Ĝi decidis proponi al la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo, ke la nombro da membroj de ĉiu grupo (ŝipposedantoj kaj maristoj) en la Komisiono estu pliigata de kvin al sep.

---

## La Komitato pri la Okhora Labortago.

La Komitato pri la Okhora Labortago konsistanta el dekdu membroj de la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo, kunvenis en Genève la 26-an kaj 27-an de Januaro, sub la prezido de S-ro Sokal, delegito de la Pola Registaro. La celo de tiu komitato, starigita en Oktobro 1926, estas kolekti precizan dokumentaron pri la daŭro de laboro kaj ekzameni, ĉu estas eble fari ion por plifortigi la klopodojn de la Direktoro por rapidigi la konfirmon de la Washingtona Konvencio.

Ĉe ĝia unua kunveno, en Novembro, la Komitato komisiis al la Oficejo la preparon de raporto pri la reguligo de laborhoroj per leĝoj kaj kolektivaj kontraktoj en la diversaj Eŭropaj landoj. Tiu raporto estis prezentita, kaj la Komitato gratulis la Oficejon pri la tre ampleksa dokumentaro kolektita.

La komitato aprobis raporton, kiun S-ro Sokal devus prezenti al la Administra Konsilantaro, kaj esprimis la opinion, ke la laboro farita de la Oficejo helpos la klopodojn de le Direktoro por certigi la konfirmon de la Washingtona Konvencio.

---

## La 34-a kunsido de la Administra Konsilantaro.

La Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo kunvenis en Genève, la 28-an, 29-an kaj 30-an de Januaro.

La Prezidanto, S-ro Arthur Fontaine, bonvenigis la novan reprezentanton de la Japana Registaro, S-ro Kasama, kiu dankis kaj promesis, ke li daŭrigos, kun fervoro egala al tiu de sia antaŭulo, S-ro Mayeda, kunlaboron de sia lando en la tasko de la Internacia Labora Organizaĵo.

La Konsilantaro diskutis la raporton de la Direktoro, S-ro Albert Thomas, pri la laboro de la Oficejo post la lasta kunsido. Ĝi konstatis la bonan progreson de konfirmoj de konvencioj, konfirmoj kies nombro estas 215. S-ro Thomas sciigis la Konsilantaron pri la situacio rilata al la okhora konvencio kaj la ŝancoj de ĝia konfirmo flanke de Granda Britlando, Francujo kaj Germanujo.

S-ro Butler, la Vicdirektoro, prezentis raporton pri sia vojaĝo en Usono kaj Kanado. La Konsilantaro gratulis S-ron Butler pri la interesaj informoj, kiujn li alportis de lia vojaĝo, kiu certe plifirmigos la rilatojn inter la Amerikaj landoj kaj la Organizaĵo.

La Germana Registaro prezentis al la Konsilantaro proponon por faciligi kaj pliigi la uzon de la Germana lingvo en la Konferenco, kaj la Konsilantaro decidis komisii al la Komitato pri Reguloj la ekzamenon de tiu demando.

La Konsilantaro diskutis la rezolucion de la Naŭa Kunsido de la Konferenco pri la eventuala kunvoko en 1928 de speciala mara konferenco por ekzameni precipe la demandon pri la internacia reguligo de laborhoroj surŝipe. La Komuna Mara Komisiono jam konsideris tiun proponon kaj rekomendis la kunvokon de tia konferenco.

La diskuto estis tre viva. La Brita Registaro-delegito kaj la mastra grupo favoris la prokraston de la demando al la sekvonta kunsido. La konsilantaro malakceptis tiun proponon kaj decidis, per 13 voĉoj kontraŭ 9, ke la demando pri reguligo de laborhoroj surŝipe estu provizore enmetata en la tagordon de speciala kunsido de la Konferenco, kunvenonta en 1928. La definitiva tagordo estas farota de la Konsilantaro en Aprilo.

La Konsilantaro devis starigi la tagordon de la ordinara kunsido de la Konferenco en 1928. Por eviti ke la programo de tiu kunsido, kiun verŝajne sekvos speciala mara kunsido, estu tro ŝarĝita, oni decidis enmeti en ĝian tagordon nur unu demandon, tio estas la antaŭforigo de laborakcidentoj, inkluzive tiuj rezultantaj de la kunigado de veturiloj sur la fervojoj.

La Konsilantaro tiam komencis la diskuton de la raporto prezentita de S-ro Sokal en la nomo de la Komitato pri la Okhora Labortago.

S-roj Lambert-Ribot kaj Oersted montris la malfacilaĵojn kiuj, laŭ opinio de la mastroj, ankoraŭ malhelpas la konfirmon de la Washingtona konvencio.

S-ro Jouhaux rememorigas la interkonsenton faritan la pasintan jaron en London inter la Ministroj de Laboro de Francujo, Granda Britujo, Germanujo, Italujo kaj Belgujo pri komuna interpreto de iuj artikoloj de la Konvencio. Belgujo jam efektivigis la interkonsenton kaj konfirmis senrezerve la Konvencion. S-ro Jouhaux insistis, ke la ceteraj koncernataj Registaroj konfirmu kiel eble plej frue la Konvencion.

S-ro Wolfe parolis en la nomo de la Brita Registaro kaj S-ro Poulton en la nomo de la Britaj laboristoj. S-roj Oudegeest kaj Müller ankaŭ esprimis la malkontentecon de la laboristoj pro la ĉiam prokrastita konfirmo.

Fine, S-ro Albert Thomas resumis la debaton kaj deklaris la motivojn pro kiuj li daŭre esperas. Li montris, sur la bazo de lasttempaj okazintaĵoj, la konstantan progreson de la Okhora ideo en la grandaj industriaj landoj, precipe en Francujo, Britujo kaj Germanujo. Li esprimis sian opinion, ke la laboro de la Okhora Komisiono helpos la Internacian Laboroficejon daŭrigi kaj plivastigi ĝiajn klopodojn por certigi la fruan konfirmon de la Washingtona Konvencio.

La Konsilantaro traktis du proponojn de S-ro de Michelis, reprezentanto de la Itala Registaro, pri la starigo de konstanta komitato pri intelekta laboro kaj pri la funkcio de la Internacia Laboroficejo rilate al instrua kinematografio. Ĝi komisiis al la Direktoro la preparon de projekto por la starigo de konstanta komisiono, pri kiu la Konsilantaro decidos en la sekvonta kunsido.

